Skövde (Svedlando) la 16:an de jan. 1946.

Kopio por Ni.

S-ro Roland Dupuis
100, rue Lafayette
R o u e n.
Francujo

Kara amiko,

La poŝtkarton, kiun mi sendis al vi la 12:an n.m., vi certe bonorde ricevis. Nun mi volas detale respondi vian leteron de la 10:a, kies enhavon mi konigis al la estraro de SEF en Stockholm.

1. Pri via abono je Sv. Esp. Gazeto mi petas vin akcepti tiun ĉi abonon kiel amikan donacon. Sekve vi ne devas sendi monon al mi.

2. Tre volonte mi provos disvendi viajn librojn "Norda Kanto" kaj - se restas - "Nederlandaj rakontoj". Mi petis de s-ino Alamo informon pri la grandeco de la restanta stoko. Event. mi prizorgos anoncon en Sv. Espéranto-Gazeto, ĉar mi scias, ke multaj svedaj esperantistoj tre volonte volas akiri la belajn librojn kun alloga kaj ĉarma enhavo. La librojn oni povas ekspedi post mendo rekte el s-ino Alamo kontraŭ poŝtrepago, kreditante vian poŝtgiran konton en Stockholm. La promesita rabato prefere estu uzita por kovri la poŝtelspezojn, kiujn la mendantoj do ne devas pagi. Cetere s-ino Alamo akceptu iom por sia laboro pri la ekspedado.

3. Mi bone notis, ke vi venos al la sveda esp.-kongreso en Uddevalla. Pri la programo tie mi ankoraŭ ne povas doni detalojn. Tamen mi scias, ke estos aranĝata somera restado (t.n. somera universitato), kiu aranĝas Sveda Esperanto-Instituto.

Dum la kongreso mem vi kaj ges-roj Petras certe havos okazon prezenti programon. Pri event. honorario vi tamen devas rekte interrilati kun la oficejo de SEF, Tegelbacken, Stockholm. En la malferma kunsido estos nur okazo je 3-5 minuta saluto de eksterlandaj gastoj. Sed povas esti, ke la kongresa komitato (en la Uddevalla-klubo)volas aranĝi por vi kaj ges-roj Petras specialan programpunkton, ekz. en la pentekosta dimanĉo aŭ lundo.

Pri prelegoj kaj prezentadoj de vi tri dum la "somera universitato" vi prefere skribu al Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm (sekr. s-ro Malmgren). Se vi prezentos bonan programproponon kun bonstilaj prelegoj (ekz. i.a. pri muziko kun ilustroj), povas esti, ke la Instituto akceptos vin kaj pagos fiksitan honorarion. Sed pri tio - same kiel pri ev. kunlaboro en la kongresaj tagoj - mi petas vin interrilati kun la koncernaj instancoj. (Pri la lokaj kongresaranĝoj vi povas skribi al s-ro Einar Dahl, Box 900, Uddevalla.)

4. Nun mi devas bedaŭrinde komuniki al vi, ke aranĝado de prelegoj estas tute neebla dum la somero. En Svedlando la prelega sezono finiĝas en aprilo. Kompreneble estus eble kunvoki la esperantistojn mem sed la klubaj kasoj tute ne toleras elpagon de honorarioj por internaj aranĝoj. Cetere tio ne estas propagando al la ekstera publiko! Do, vi absolute ne povas kalkuli je prelegoj (prezentadoj) en la somero. Mi scias, ke kelkaj kluboj aranĝas liberaerajn festojn kun publiko ekstera sed tiaj aranĝoj ofte estas tro bruaj ktp kaj fakte arta kaj vera programo ofte ne estas sufiĉe taksata dum tiaj festoj. En la grandaj dancejoj, popolaj parkoj k.s. okazas liberaeraj programoj. Sed ni esperantistoj tute ne celas prezenti al tiu speciala publiko la sopiratajn

jazbandojn, kantistojn de "schlager" kaj gajajn operedojn. Nu, ankaŭ en tiu kampo iom post iom eble aperos artistoj helpe de esperanto, sed ĝis nun - laŭ mi same feliĉe, ĉar esp-o devas unue evolui en aliaj kampoj - ili ne aperis. Do, ĉar la prezentado de vi tri havas multe pli altan celon kaj nivelon, vi sekve komprenas, ke someraj prezentadoj tute ne estas eblaj. Mi diras ankoraŭfoje: bedaŭrinde ne!

5. Se vi tamen volas kune kun ges-roj Petras viziti nian landon kaj esp.-kongreson, vi povas ja mem decidi, ĉu vi uzu la eblecon pere de Rouen-a ŝipestro sendi monon al iu esperantisto en Göteborg aŭ Stockholm. Se la koncerna ŝipestro estas honesta homo, kiu prizorgos la aferon akurate, vi povas antaŭe interrilati kun esperantisto en la koncerna urbo, por ke li (aŭ ŝi) akceptu por vi la valuton. Vidu IEL-jarlibron.

Vian monon, kiun vi jam havas je via poŝtĉeka konto (kaj havos, se la libroj elvendiĝos), vi povas praktike mem mendi el Postgirokontoret, Stockholm, per speciala mendilo, kiun vi havas, por ke ĝi estu sendata al la sama persono, kiu akceptas por vi valuton pere de ŝipestro de Rouen. Sekve vi havos ĉiun vian valuton je dispono, kiam vi albordiĝas. Se vi (kaj ges-roj Petras) poste povas perlabori iom dum la kongreso, mi kompreneble ne povas diri, sed vi mem interrilatu pri tio jam antaŭ via alveno Svedujon.

6. Mi esperas, ke vi komprenas, ke mi per tiu ĉi letero deklaris, ke mi estas preta helpi vin pri la vendado de viaj libroj kaj tiamaniere certigi al vi almenaŭ iom da valuto. Kompreneble mi ne povas esti respondeca por via restado en Svedujo somere 1946. Se la kongreso kaj la Instituto certigas al vi fiksitan sumon, tio estus bone, sed mi persone ne povas influi je tio. Vi devas mem serĉi kontakton kaj fari interkonsentojn.

Se vi estus alvenintaj jam nun en januaro kaj via alveno estus bazinta je plena interkonsento en ĉiuj rilatoj, mi atentigas vin pri tio, ke prelegoj (prezentadoj) certe tiam eblus. Same, se vi alvenos aŭtune 1946, la eblecoj jam ekzistus por rondvojaĝo kaj aperoj en antaŭe fiksitaj lokoj je akurate fiksitaj kondiĉoj. Sed nun la afero estas, ke vi alvenos nur meze de la mallonga sveda somero, kiam kondiĉoj por rondvojaĝo por tiu celo tute ne eblas.

Ĝuste nun - post sciigo pri via neebleco veni ĉivintre - okazas interrilatoj kun ĉeĥo, instruisto s-ro Jozef Vitek, kiu event. venos por prelegoj, garantiataj de la ĉeĥa ministerio mem.

Mi bedaŭras, se mia letero ŝajnas al vi iom rigida. Sed tiaj estas ni svedoj. Ordo kaj bona organizo estas por ni numero unu; sentoj kaj kordeziroj devas veni nur duavice. Sed plej ofte ni sukcecas kunordigi la du postulojn tute harmonie kaj por la bono de ĉiu.

Persone mi mem tre ĝojus vidi vin dum la tri Uddevalla-tagoj. Verŝ. mia somera libertempo ne permesas al mi ĉeesti la someran universitaton en Uddevalla ĉi jare, sed eble.....

Mi tre volonte respondos je viaj leteroj, se vi deziras informojn ktp.

Sincere salutas

[signature]

PS. Anoncon pri viaj libroj en Stockholm mi prizorgos je mia propra kosto, ĉar mi fakte deziras, ke vi nun fine havu la eblecon ĝui libertempon en Svedujo kaj la ĉarma Uddevalla-regiono.